

B O N A E S P E R O

Gazeto de la Sudafrika Esperanto-Asocio

Januaro, 1982

ISSN 0006-7024

DEK PLEJ GRANDAJ LINGVOJ

La afero de "grandaj lingvoj" dependas de la multnombro de la parolantaroj. Kaj la parolantaroj de lingvoj ne same rapide evoluas nombre.

Tial ni baraktis kun ciferoj el diversaj fontoj kaj faris provizoran konkludon pri la 10 plej multnombraj lingvoj denaske parolataj en la mondo en la jaroj 1978 kaj 2 000.

LA ANGLA LINGVO NE PLU ESTOS LA DUA EN LA JARO 2 000. La nombroj de la parolantaroj en la jaro 2 000 estas kalkulitaj per la elcentaĵoj de loĝantaraj kreskoj, sendataj de UN kaj aliaj statistikaj instancoj. La nombroj de la parolantaroj en 1978 estas bazitaj sur la UNa statistiko pri la landaj loĝantaroj. Jen la ciferoj, en milionoj da homoj:

	<u>EN LA JARO 1978</u>	<u>EN LA JARO 2000</u>
1	Ĉina 863	Ĉina 1300
2	angla 350	hispana 420
3	rusa 262	angla 400
4	hindia 255	hindia 370
5	hispana 234	rusa 320
6	indonezia 145	portugala 260
7	araba 126	indonezia 230
8	portugala 125	araba 200
9	bengala 123	bengala 185
10	japana 115	japana 128

Se ni kalkulas la hindian kaj urduan lingvojn kune, kiuj ambaŭ tre intersimilas, se ne paroli pri la skrib-sistemoj, la pozicio de la hindi-urdua iĝas en la jaro 1978 la trie plej granda lingvo per 330 milionoj da parolantoj, kaj en la jaro 2000 la due plej granda lingvo per 465 milionoj da parolantoj.

En la jaro 2000 la angla lingvo ne plu okupos la duan lokon pro la rapida kresko de la nombro de hispanparolantoj.

SUDAFRIKA ESPERANTO-ASOCIO

P. O. Box 1227, Cape Town.

PREZIDENTO: s-ro E. de Kock
VIC-PREZIDENTO: s-ro A. von Blottnitz.
SEKRETARIO: s-ro O. Sher.
KASISTO: s-ro C.S. Beckford.
KOMITATANOJ: s-ino A. Fouché; s-roj H.W. Appel,
d-ro J. van D. Strydom, F.M. Woolf.

ENHAVOJ

Dek Plej Grandaj Lingvoj	1
Estraro kaj Enhavo	2
Avizo pri Jarkunveno	3
Centjara Datreveno de Esperanto	4
"Bona Espero" de B.B. FitzPatrick	5
Skolta Esperanto-Ligo	6
Hidrogeno	7
Trilingva	8
Artikolo	9
Tie kaj Tie en Esperantujo	10
Diversaĵoj	11
Venteraĵoj	12
Centjara Datreveno, Daŭrigata	13
"Bona Espero", Daŭrigata	14
Deziras Korespondi	15
El Nia Gramatiko	16

Redaktoro: F.M. Woolf, Box 18, SEA POINT, 8060; tel:
44.2657, helpe de C.S. Beckford, tel: 22.6326, hejme:
77.0588.

La 18a jarkunveno de la Asocio okazos Dimanĉon, la 21an de Marto, 1982, je 14h30 ĉe s-ro H.W.Appel, 8, St. Michael Rd, New Redruth, Alberton, 1450 (Tel: (011) 869.4031).

TAGORDO

1. Antaŭa protokolo, kaj traktado de aferoj estiĝantaj el ĝi.
2. Raporto de la Prezidanto.
3. Raporto de la Sekretario kaj pritraktado de korespondadoj.
4. Raporto de la Kasisto.
5. Elekto de Nova Estraro.
6. Aliaj aferoj.

Mi petas, ke oni sendu al mi, kiel eble plej frue, nomojn de membroj, kiujn oni deziras proponi por elekto al la nova komitato/estraro, kun ilia konsento agi, se elektitaj. La nunaj komitatanoj estas petataj informi min, ĉu aŭ ne ili konsentas al refoja elekto por plua jaro.

Membroj, kiuj ne povas ĉeesti la kunvenon, estas petataj ensendi siajn komentojn, opiniojn, ktp., al mi, por ke oni povu pritrakti ilin sub la ĉi-supra ero 3. Mi speciale deziras ricevi raportojn pri Esperanto-agado de la diversaj grupoj en la lando.

La Financa Raporto por la 1981 kalendarjaro troviĝas enmetite.

O. Sher,
Sekretario.

* * *

En Londono, Anglujo, la Esperanta Parlamenta Grupo konsistas nun el 126 membroj. En unu jaro H. Brown, komisiita de Londona E.o-Klubo aranĝis entute 12 paroladojn pri la Internacia Lingvo. En la universitato de Manchester la 18an de Oktobro okazis por la oka sinsekviva fojo Esperanto-lekcioj de d-ino Marjorie Boulton.

ENKONDUKO:

Rapide alproksimiĝas la 100-jara datreveno de la Internacia Lingvo Esperanto. Kvankam, bedaŭrinde, pro la konataj kaŭzoj, la Esperanto-Movado estas profunde dividita kaj tial ankaŭ malfortigita, tamen ekzistas ankaŭ aferoj de ĝenerala, komuna intereso. Unu el ili sendube estas la centjara datreveno de Esperanto en 1987. Ĝi devus kunligi absolute ĉiujn Esperanto-organizaĵojn: politike neŭtralajn, neneŭtralajn, sendependajn kaj dependajn, fakajn kaj nefakajn, kiel ankaŭ la neesperantajn instancojn kaj instituciojn, kiuj uzas la Internacian Lingvon por siaj celoj. La tuta 1987 devus fariĝi la Jaro de la Internacia Lingvo kun ĉiuflanka pritrakto de la lingva problemo en la nuntempa mondo, kaj altnivela argumentado por radikala solvo pere de Esperanto. Tio samtempe devus kaŭzi plian, eble eĉ amasan disvastigon de la lingvo kaj de ĝia uzado en internaciaj rilatoj. Por ke la datrevena jaro estu digne kaj efike memorigita, necesas zorge, celkonscie kaj ĝustatempe antaŭprepari ĝin. Tial nia konferenco pritraktos la demandon en formo de prelegoj kaj detalaj diskutoj pri la unua skizo de la Agadprogramo por tiu unika historia kultura evento.

PRECEDENTOJ

Tuj post la dua mondmilito UEA iniciatis la Peticion al UN; en 1950-52 estis organizita tutmonda agado kun la celo jure devigi la Ĝeneralan Konferencon de Unesko enmeti la Peticion en sian tagordon, kio plene sukcesis; en 1952-54 okazis mondskala laŭplana kampanjo, kiu rezultigis la konsultajn rilatojn de UEA kun Unesko kaj la jam faman Rezolucion de Unesko de la 10a de Decembro 1954 favore al Esperanto; en 1957-59 realiĝis ĉiuj planitaj preparlaboroj por la celebrado de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof; unu el la multaj pozitivaj atingoj estis, ke Unesko deklaris D-ro Zamenhof "unu el la grandaj personecoj de la homaro". Tiujn kaj plurajn aliajn similajn agadojn siatempe iniciatis kaj organizis UEA. Nun la iniciaton transprenis la INTERNACIA CENTRO DE LA NEŬTRALA ESPERANTO-MOVADO (la CENTRO), sed ĝi plene konscias, ke nur kunlabore kun UEA, SAT kaj kun ĉiuj aliaj Esperanto-

de B.B. FitzPatrick.

Estis bela printempa vespero. Malgrandaj cirusaj nuboj roznuancaj en la oriento iomete heligis la koloron de la nigra-bruna haŭto de la preterpasantoj en la antaŭurbo Harare, sep aŭ ok kilometrojn distance de Salisbury. Kaj estis dimanĉo.

Marufu, junulo kun nur dek naŭ jaroj sur sia vivtabulo, estis reiranta al sia loĝejo post distra futballudado. Liaj brilantaj okuloj indikis, ke ĝojo regis en lia koro, kaj li fajfis gajan melodion.

Guste tiam li ekvidis karton-skatolon sur biciklo-portilo apud la pordo de la drinkejo nomita Matapi. Sajnis, ke la posedanto de la biciklo, enironte la drinkejon por sensoifiĝi, starigis ĝin ĉe la muro.

La skatolo, ligita al la portilo per strioj faritaj el forĵetita aertubo, grade altiris la atenton de Marufu, pro tio ke en ĝi vidiĝis kelkaj neatenditaj truetoj.

Lia fajfado formortis. "Tutcerte en tiu skatolo kuŝas grasa kokino", lidiris al si, "jam longtempe mi ne manĝis kokinon el mia hejmlando!"

Cirkaŭen rigardinte, li alproksimiĝis al la biciklo, kaj, malliberiginte la skatolon, rapide ekprenis kaj, metinte ĝin surkape, rapide marŝis al sia loĝejo. "Sendube", li pensis, "ĉi tiu kokino devas esti grandega, ĝi tiom pezas".

Tien alveninte, li renkontis sian kunloĝanton Fani. Ili kune eniris la ĉambron - kiu konsistigis lian loĝejon sur la teretaĝo de granda apartament-bloko. Marufu metis sian pakadon sur la tableton kaj diris al Fani: "Bonvolu ŝlosi la pordon!" Tion farinte, Fani demandis: "Kio okazis? Kio estas en la skatolo?" Marufu mallonge rakontis al li pri sia aventuro. Ĉe ili ambaŭ komencis abunde salivadi, jam antaŭguante la atendatan bongustaĵon, kiun ili post nelonge dividis. Ili do decidis tuj prepari la vespermanĝon.

La unua tasko estis elpreni la kokinon por ĝin mortigi. Fani forigis la kaŭĉukajn bendojn kaj malfermis la skatolon. Kia terura konsternego! Guste kiam li etendis sian manon por kapti la birdon, aperis la kapo de granda serpento. Ekkriante "Inyoka! Ishato!" ili samtempe

(al paĝo 13)

Post longa periodo de neaktiveco dum kiu pluraj malfacilaĵoj trafis nin, la Centra Komitato nun esperas, ke ĝi trovis elirejon el la malagrabra situacio.

Ni faris plurjaran laborplanon, kiun ni kontrolos kaj, se necese, ĝustigos ĉiujare.

Ni uzis la okazon por modernigi kaj plibonigi la organizan strukturon kaj forigi la erarojn, kiujn ĝi amasigis dum sia ĉ. sesdekjara ekzistado.

La nuna metodo celas efike kaj utile uzi niajn rimedojn nome, la helpon kaj energion de niaj kunlaborantoj, kaj niajn enspezojn.

Nia revuo "La Skolta Mondo" denove aperos, espereble same akurate kiel ni kutimis fari dum pli ol jardeko, kaj kun enhavo kiu valoros ne nur por skoltoj, sed ankaŭ por ĉiu junulo.

Ni esperas, ke nia Ligo estos renkontejo unue por la membroj de la internaciaj skoltaj organizaĵoj, sed ni kiel gaston akceptos ĉiun, kiu simpatias kun la celoj de Skoltado.

Por ebligi tion, ni invitas plenkreskulojn al kunlaboro kaj aktiva helpo, por varbado de membroj kaj abonantoj. Ili bonvolu subteni nin per siaj kotizoj. Tiel farante ni modeste kontribuu al la feliĉo de la juna generacio de la Esperanto-movado.

(Ni enmetas tiun ĉi avizon/cirkuleron je la speciala peto de nia membro, s-ro H.W. Appel, kiu mem estas tre aktiva membro de la Skolta Movado, kun la espero, ke bonaj rezultoj sekvos, kiel dezirataj).

* * * *

EL BIRMINGHAM EVENING MAIL, JAN., 1981: BEVAN JOINS ESPERANTO CAMPAIGN. A Birmingham MP has joined a government group fighting for acceptance of the International Language Esperanto. Yardley's Mr. David Bevan is the latest of 127 MP'S to join the Esperanto Parliamentary Group, making it the largest non-party political group in Westminster. English is not acceptable as an international language, the group claims.

* *

La sensacia malkovro de iu itala sciencisto povus baldaŭ solvi, en maniero pura kaj malmultekosta, la kreskantan bezonon le brulaĵoj. Ezio Pelizzetti, profesoro de kemio ĉe la universitato de Turin, 37jara, kune kun teamo de junaj esploristoj, sukcesis produkti hidrogenon disigante ĝin el akvo en tre rapida maniero kaj per la helpo de simpla lum-radio. "Nun fine oni povas vere paroli", diris li, "pri brulaĵo konkrete alternativa kompare kun petrolo kaj karbo; temas pri la ebleco ekspluati energifonton enorman kaj neelĉerpeblan por la homaro".

Jam de pluraj jaroj en multaj landoj, precipe en Usono kaj Japanujo, oni pristudas hidrogenon, sed ĝis nun oni ne sukcesis produkti ĝin malmultekoste. Tial hidrogeno restis ĝis nun neuzita, aŭ uzita nur kiel luksa brulaĵo por kosmaj raketoj. La graveco de la malkovro de la profesoro kuŝas en tio, ke la hidrogeno estos, ekde nun, produktebla malmultekoste.

La sciencisto en siaj esploroj antaŭ ĉio observis la naturon kaj precipe la plantojn: "La sintezo de klorofilo pere de lumo", li klarigis, "estis mirinda ekzemplo pri disigo de hidrogeno el la akvo. Oksigeno liberigas en la aeron kaj hidrogeno kombiniĝas kaj liveras la naturaĵon, kiu ebligis al la vegetaĵoj pluvivi. Mi sekvis ĉi tiun vojon, utiligante du reakciilojn: rutenion, iun metalon tre senteman je la lum-radioj, kaj titanon dioksidon, kombinaĵon, kiu funkcias kiel katalizilo. Tiel mi sukcesis rapide disigi hidrogenon".

Pelizzetti estas konvinkita, ke ĉi tiu estas la brulaĵo de la estonteco anstataŭ petrolo, des pli, ke ĝi havas la avantaĝon, ke ĝi ne postlasas malpurajn skoriojn. Jam nun ekzistas aŭtomobiloj funkciantaj per hidrogeno, kaj la eksplod-motoroj povas esti adaptataj per nur kelkaj modifoj.

La itala sciencisto eksperimentis sian malkovron en Svislando, ĉar li ne havis je sia dispono en Italujo la bezonatajn aparatojn. Pri liaj studoj tuj okupiĝis la plej gravaj eksterlandaj sciencaj periodaĵoj. La "Chemical and Engineering News" dediĉis al la afero kvarpaĝan artikolon, tiel igante la profesoron subite populara en la tuta mondo. ** El "La Migranto".

Kiam vi komencas telefoni, la ĝisdatigita ekipaĵo ĉe via centralo aŭtomate elektas la deziratan numeron laŭ la impulsoj generitaj per la turniĝado de la ciferplato. Tiu ĉi estas ankaŭ sentiva je la plej eta, neĝusta movo, kaj naŭ fojojn el dek estas precize tie, kie nekorektaj numeroj originas.

EVITU ĈI TIUJN OBSTRUKCOJN OBSERVANTE LA JENAJN, SIMPLAJN REGULOJN:

Antaŭ ol ekpreni la aŭdilon por telefoni, certigu, ke vi havas la ĝustan numeron. Oportune havu liston de la numeroj, kiujn vi ofte diskas.

Atendu la ĝustan tonon (kontinuan br-r-r sonon) antaŭ ol diskii. Se vi ne aŭdas ĝin post kelkaj sekundoj, remetetu la aŭdilon kaj atendu kelkan tempon antaŭ ol provi denove.

Disku zorge kaj glate kaj certigu, ke via fingro tuŝu la stangeton. Ne perforte revenigu la ciferplaton. Lasu ĝin ĉiufoje reveni per si mem al la startejo. Perforta resendo de la ciferplato riskas kaŭzi, ke nekorekta nombro da impulsoj estos transsendita al la centralo. Memoru ankaŭ, ke troa prokrasto inter la diskado de la individuaj ciferoj de iu numero povos kaŭzi la nuligon de la alvoko.

Neniam uzu krajonon aŭ alian ilon per kiu diskii. Se, diskante, vi faras eraron, aŭ via fingro flanke glitis, remetetu la aŭdilon kaj komencu denove.

When you make a telephone call, the sophisticated equipment in your exchange automatically selects the number required according to the impulses generated by the turning of the dial.

The dial is also sensitive to the slightest wrong movement and nine times out of ten this is where wrong numbers originate.

AVOID THESE FRUSTRATIONS BY OBSERVING THE FOLLOWING RULES:

Before picking up the handset to make a call ensure that you have the correct number.

Keep a list handy of the numbers that you dial frequently.

Wait for the dialling tone (a continuous br-r-r sound) before you dial. If you do not hear it within a few seconds, replace the handset and wait awhile before trying again.

Dial carefully and smoothly and ensure that your finger touches the fingerstop every time.

Do not force the dial back - let it return to the rest position freely each time. Forcing the dial back can cause an incorrect number of impulses to be transmitted to the exchange. Also remember that excessive delay between dialling the figures of a number can cause the call to fall away.

Never use a pencil or other object to dial with.

If you make a mistake when dialling or your finger slips, replace the handset and start again.

Wanneer u 'n telefoonoproep maak, kies die gesofistikeerde toerusting in u sentrale outomaties die verlangde nommer volgens impulse wat deur die draaing van die skakelskuif opgewek word.

Die skakelskuif is ook gevoelig vir die geringste verkeerde beweging en nege uit die tien maal is dit hier waar verkeerde nommers ontstaan.

VERMY HIERDIE FRUSTRASIES DEUR DIE VOLGENDE EENVOUDIGE REËLS NA TE KOM:

Voordat u die handstuk optel om 'n oproep te maak, verseker dat u die korrekte nommer het.

Hou 'n lys van nommers wat u dikwels skakel byderhand. Wag vir die skakeltoon ('n aanhoudende brr-geluid) voordat u skakel. As u dit nie binne 'n paar sekondes hoor nie, plaas die handstuk terug en wag 'n rukkie voordat u weer probeer.

Skakel versigtig en egalig en verseker dat u vinger elke keer die vingerstop raak.

Moenie die skakelskyf terugforsaer nie - laat dit elke keer vryelik na die russtand terugdraai. Deur die skakelskyf terug te forsaer, kan u veroorsaak dat 'n verkeerde aantal impulse na die sentrale oorgesein word.

Onthou ook dat oormatige vertraging tussen die skakeling van die syfers van 'n nommer kan veroorsaak dat die oproep wegval. Moet nooit 'n potlood of ander voorwerp gebruik om mee te skakel nie.

UEA nun havas membrojn (asociajn kaj individuajn) en 100 landoj.

La 69a UK de Esperanto okazos inter la 21a kaj 28a de Julio 1984 en Vancouver (Brita Kolumbio), Kanado. ** Francois Mitterand, nova Prezidento de Francio, antaŭ sia elekto, skribis al SAT-amikaro la jenon: "Se la Francoj elektos min, mi petos la registaron submeti la por-Esperantan leĝproponon al la Parlamento". **

En Francio, en la urbo Toulon, ĝardenplaco nun havas la nomon Dr. Zamenhof (16.05.81), kaj en Bunol, Hispanio, nun estas Zamenhof-strato (fine de 1980).

Inter la Koreaj parlamentanoj troviĝas 3 Esperantistoj. En Majo, Korea Esperanto-Asocio okazigis du elementajn kursojn por urbanoj en Seulo. Aligis ĉirkaŭ 50 homoj.

Festis siajn 75an datrevenon la jenaj grupoj kaj societoj: Grupo Esperantista de Bilbao, Hispanujo; Hungara Societo Esperantista en Debrecen; Germana Esperanto-Asocio; Milana Esperanto-Klubo, Italujo; Esperanto-Klubo, Rotterdam, Hollando; kaj la Esperantista Klubo en Brno, Ĉeĥoslovakio la 80an datrevenon de sia fondiĝo.

Eŭropa Parlamentano A. Fanton, Francio, kritikis menci-
on pri Esperanto en "Eŭroforum", sed lia germana kolego d-ro H.J. Seeler subtenas la Internacian Lingvon kaj trovas ĝin taŭga por interkomunikado.

Mark STARR, Esperanto Information, Long Island City, Usono, eldonigis la jenajn presaĵojn: Esperanto and the United Nations, March 1981; Esperanto Society of New York City, April 1981; gazetartikolon de Elizabeth Brafford; prospekton de Stuyvesant Youth and Adult Centre, New York.

Esp.o-Klubo ĉe Teknika Altlernejo en urbo Gihu, Japanujo, sukcesis varbi por nova lernoĵaro rekordan nombron de 34 membroj. En la universitato de Nagano komenciĝis nova seminario oficiala sub la titolo "Lernado de Esperanto laŭ idea flanko kaj lingvistika flanko" sub la gvido de prof. Sekido Yosimitu.

En la universitato de Puneo, Hindio, P. Daŝgupto instruas Esperanton dufoje semajne.

BEDAŬRINDE S-ino Sörenson el Malmö forkuris de sia'edzo jam la unuan tagon. La ne plu juna historiisto dum la nupta nokto nur laŭtlegis al ŝi pri geedziĝfestaj moroj en pasintaj jarcentoj.

FERA VOLO Per longjara ekzercado la 30-jara meksikano Pablo Macias akiris la kapablon mirinde rapide kuri "kvarpiede". En konkurso kontraŭ kvin hundoj li gajnis la duan lokon. Nur unu, ĉashundo, estis pli rapida.

FULMRAPIDE La energia agado de pluraj maljunaj damoj malhelpis atakon je supermarkto en Vieno. Viro per pistolo minacis kasistinojn, kiam la aĉetintinoj komencis ĵeti sur lin varojn el siaj korboj. Nur per rapida fuĝo la krimulo povis savi sin el la senĉesa bombardo de pomoj, potoj kaj salamoj.

LOGIKA SEKVO Enketo inter anoj de la movado "Saniga Kurado" en Usono montris, ke inter la kuremuloj (uson-
angle nomitaj "jogger") troviĝas multe pli da eksedziĝ-intoj ol inter la meza enloĝantaro. Specialistoj klarigas la fenomenon tiele: "Daŭra kurado stimulas la sango-cirkuladon; pro tio la aktivuloj vidas pli klare".

TUTMONDA ESPERANTISTA VEGETARANA ASOCIO

estis fondita de Tolstoj, Zamenhof kaj Ladevêze en jaro 1908, do en la sama jaro kiel UEA.

TEVA agadas dudirekte: Ĝi disvastigas Esperanton inter vegetaranoj kaj vegetarismon inter Esperantistoj, kaj antaŭenigas la internacian solidarecon de la vegetarana movado.

En TEVA estas membroj, kiuj tute forlasis la viandmanĝadon (ankaŭ fiŝ-), kaj simpatiantoj, kiuj aprobas la vegetaran idealon sed kies cirkonstancoj ne permesas ke ili ĉiam abstinu la viand- kaj fiŝmanĝadon.

Unu el la nunaj klopodoj de TEVA estas la ofiĉialigo de Esp-o kiel la tria lingvo dum la 26a Mondkongreso de la Internacia Vegetara Unuiĝo. Tiu kongreso okazos en Ulm (Germanujo) dum la somero de 1982. Ju pli da Esperantistoj partoprenos, des pli la ebleco, ke nia Internacia Lingvo estos tie ofiĉiale akceptita.

(Pluaj detaloj de la Redakcio)

Eksterlanda eminentulo vizitante Sudaŝafrikon deziris vidi ion el la ĉiutaga vivo de la nigruloj. Oni do venigis lin al sportkampoj en iu nigrula urbo kie du teamoj ĝuste tiam viglege estis ludantaj rugbeon, ludon kiu en Sudaŝafriko estas praktikata pleje de la blankuloj, dum la nigruloj preskaŭ senescepte preferas la ordinaran futbalon.

La eksterlandano dum kelka tempo rigardis la rugbeon, kiun ŝajne li ne konis, kaj li diris al sia sekretario: "Naŭzas min vidi kiel la ĉitieaj nigruloj estas tiel subpremataj de la blankuloj, ke tridek el ili devas batali kiel malsataj sovaĝaj bestoj, klopodante akiri por si ludilon. Rapide prenu taksion al butikoj kaj urĝe aĉetu tridekon da tiuj ovsimilaj pilkoj, por ke ĉiu havu sian propran". **

Ĉe Durban (Natalo) kelkaj nigruloj forportis ujon enhavantan ĉirkaŭ cent litrojn da metil-alkoholo (ligno-alkoholo), kredante tion esti la etilalkoholo kiu troviĝas en brando kaj aliaj alkoholaj drinkaĵoj. Kune kun amikoj ili pogrande komencis festi, rezulte de kio laŭscie mortis 18 el ili pro tiu forta veneno, dekduoj poste troviĝis en malsanulejo, kaj ĉe nur unu industria entrepreno 27 nigruloj "malaperis" - ili neniam revenis al sia laborloko. **

Iu Usona negromovado eldonis kajeron enhavantan desegnaĵojn por infanoj, kiujn la etuloj devis kolorigi, kaj jen oni havas belajn "pentraĵojn". Ili temis pri la malnova devenlando Afriko. Troviĝis bildoj de la belegaj urboj, kasteloj, palacoj, ktp., ĉiuj kiuj neniu loke nuntempe troviĝas en Afriko, sed la eldonintoj havas klarigon: La fiaj Blankuloj venis Afrikon kaj ĉion forbrulis, detruis! La unuaj Blankuloj kiuj explore vojaĝis tra Afrikon (Livingstone, Stanley kaj aliaj) nek vidis tiajn urbojn, nek rakontis pri iaj tiaj. **

Usona ino, Louisa Zimmerman, petis (kaj akiris) permeson oficiale ŝanĝi sian familinomon al Zimmerwoman. Laŭ ŝi, Zimmerman devenas el la tempo de vira subpremo de la inoj. **

(El diversaj fontoj ensendis E.S. Venter.)

fulmrapide malaperis tra la fenestro. Kiam la korbato normaligis ili rapidis al la policejo por sciigi pri la grandega serpento en ilia ĉambro. Unue, neniu kredis al ili, sed post iom da pridemandado, du policianoj konsentis akompani la du junulojn al ilia loĝejo.

Ce la pordo la serĝento ordonis al Marufu: "Donu al mi la ŝlosilon". Respondis tiu ĉi: "Mi ne havas ĝin, ĝi estas interne". Ili do perforte malfermis la pordon, serĉis la serpenton, sed ne trovis. Lasinte la fenestron malfermita, Marufu kaj Fani do supozis, ke la rampulo eskapis tra ĝi, ĝuste kie troviĝis densa kreskaĵaro. Ĉar estis tro mallume por serĉi, ili ĉiuj reiris al la policejo. Tie troviĝis viro, kiu raportis la malaperon de la pitono, kaptita de li proksime de sia vilaĝo, kun la intenco vendi ĝin al la bestogardeno. Marufu tiam konfesis, ke li fakte ŝtelis ĝin. La viro ne volis enkarcerigi la du junulojn sed postulis, ke ili rekaptu ĝin, aŭ permone kompensu lin. La poliestro diris al la du: "Atentu bone! Mi ordonas vin ambaŭ tuj komenci diligente serĉi la serpenton, eĉ se daŭros ĝis morgaŭ, kaj sen helpo".

Ili danke akceptis la juĝon, kaj kun poŝlampo enmane komencis serĉi la pitonon. Estis terura tasko. Dum la tuta serĉado ili ambaŭ malŝpare ŝvitegis pro timo. Je la dua matene la serĝento lasis ilin voki. Lacaj kaj deprimitaj ili estis kondukitaj al la policejo, kie la serĝento informis ilin, ke la pitono estas rekaptita. Li daŭrigis: "Vi krimis. Mi jam sufiĉe punis vin. Reiru al via loĝejo, kaj ne ripetu la malbonaĵon". Diris Marufu: "Dankon, multan dankon, serĝento. Mi elkore pentas, ke mi pekis". Fani sekvis: "Ankaŭ mi, serĝento, mi tre dankas por via bonkoreco".

Post kiam ili foriris, ĉiu policano eksplode ridegis, ĉar la pitonon oni jam trovis je la naŭa - kvin horojn antaŭ ol ĉesiĝis la serĉado ...

(Krom kelkaj malgravaĵoj, la ĉi-supra estas vera okazintaĵo, kiun la verkisto povas atesti. Ĉe la finlego oni povas kompreni la dusencecon de la titolo - se ĝi je la komenco estis iom enigma!)

(Inyoka = serpento. Ishato = pitono).

14 organizaĵoj kaj instancoj la giganta tasko povas esti sukcese realigita. En la prelego estos prezentita la kvintesenco de tiuj precedentoj, por ke oni povu iom lerni el la antaŭaj spertoj. Tiurilate aparte grava estas la Memorlibro pri la Zamenhofa Jaro, eldonita en 1960 de la tiama CED. Estas konsilinde trarigardi ĝin jam antaŭ la Konferenco.

ORGANIZAJ DEMANDOJ:

Konforme al la spertoj akiritaj en la organizado de la Zamenhof-jaro, la plej urĝa tasko estas formi kompetentan internacian komitaton, kies sola celo estos organizi la memorigon de la datrevena jaro. Ĝia nomo povus esti INTERNACIA ORGANIZA KOMITATO POR LA JARO DE LA INTERNACIA LINGVO (ESPERANTO) 1987, aŭ, pli mallonge, INTERNACIA KOMITATO POR LA ESPERANTO-JARO (1987). La komitato devus konsisti el reprezentantoj de ĉiuj internaciaj Esperanto-Organizaĵoj kaj de ĉiuj institucioj aŭ instancoj, kiuj uzas la Internacian Lingvon. Dum sia unua kunsido, se eble jam en 1982, sed plej malfrue en 1983, la Komitato devus:

1. akcepti DEKLARACION KAJ ALVOKON al la mondo okaze de la Esperanto-jaro.
2. akcepti BAZAN AGADPROGRAMON.
3. iniciati la formiĝon de INTERNACIA PATRONA KOMITATO (nur plej elstaraj personecoj de la publika vivo: ŝtatestroj, ĉefministroj, Nobel-premiitoj, verkistoj, artistoj, kaj aliaj kulturaj agantoj).
4. elekti sian prezidentaron kun sekretariato kiel organiza kerno de la tuta agado;
5. havigi la NECESAJN FINANCAJN RIMEDOJN el diversaj fontoj por kovri la elspezojn;
6. pritrakti aliajn organizajn demandojn;
7. lanĉi la agadon kaj realigadi la AGADPROGRAMON por atingi la kulminon dum la UNUECA MONDA KONGRESO DE ESPERANTO meze de 1987.

(Daŭrigota)

(Al ĉiuj niaj legantoj ni forte rekomendas iom serioze tralegi tiun ĉi tezaron de prelego de Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĉar ĝi tuŝas ĉiun Esperantiston ie ajn en la mondo. La jaro 1987 estos por ni ĉiuj treege grava, kaj ni devas prepari por ĝi jam nun).

TRADUKISTOJ! TRADUKANTOJ! Mi deziras fondi tutmondan asocion de esperantistaj tradukistoj. Bonvolu skribi al S-ro Zbigniew Czupka~~XX~~o, PL 24-220 Niedrzwica Duza, POLLANDO, aldonante informcele 1 internacian respond-kuponon.

Kun.respekto,
Zbigniew Czupka~~XX~~o,
Delegito de UEA

Estimataj gesamideanoj,
Mi estas esperantisto el Ĉeĥoslovakio, havas 37 jarojn kaj serĉas seriozajn kunulojn por la interŝanĝo de poŝtkartoj. Mi petas vin helpi al mi trovi kolektantojn kaj geamikojn en via lando.

Kun salutoj,
Viktor Knap,
U náhonu 126, 760 01 Gottwaldov, ĈSK.

Mi estas 14jara knabo. Min interesas korespondo kun sudafrikana komencanto. Miaj interesoj estas filatelio, Esperanto, muziko (reggae kaj pop) kaj skoltado. Ĉu vi volas helpi min akiri samĝan korespondanton. Mi estos tre danka se iu respondos.

Tre sincere salutas,
Jonas Mattson,
Hallspjällsg, 4, S-415 06, Gotenburg.
Sweden.

Estimata samideano,
Mi volonte komencos korespondi kun iu amiko aŭ amikino kiu interesiĝas pri la Esperanto-movado, kolektas poŝtmarkojn kaj esperantaĵojn.

Mi estas 33-jaraĝa viro, instruisto de geografio en mezlernejo, edziĝinta kun 2 infanetoj. En apuda urbo troviĝas E-klubo, kie renkontiĝas la klubanoj.

Atendante respondon,
Sincere salutas,
Jan Džillrka,
Str. J. Stowackiego 34, 46-020,
Swierkle, Pollando.

* * * * *

La 6 tempoj en la Esperanta gramatiko troviĝas en nur unu frazo, verkita de la jam longe forpasinta Cezaro Rossetti en lia Kredu min, Sinjorino!

Ankoraŭ ne, jam ne, ne plu.

ANKORAŬ NE (kiel ankaŭ ANKORAŬ antaŭ aliaj negativaj vortoj) signifas: ne ĝis la nuna (aŭ tiam) momento.

1. Si ankoraŭ ne trovis la monon kiun si perdis.

2. Ankoraŭ neniam mi vidis lin en tiu distrikto.

3. Mi ricevis de li ankoraŭ nenian sciigon.

JAM NE signifas: de nun ne (aŭ, de tiam ne).

4. Multaj el niaj pioniroj jam ne vivas.

5. Li ne estis sufiĉe klera, sed lerni li jam ne havis la eblecon.

6. Li jam ne volis lerni la lingvon.

NE PLU signifas: ne daŭre, ne pli longtempe, aŭ ne pli malproksimen.

7. Mi lin ne plu vizitos.

8. Ili ne povis iri plu, ĉar ili jam estas tro lacaj.

La signifodiferencoj inter JAM NE kaj NE PLU estas iom subtilaj kaj en kelkaj kazoj eĉ ne rimarkeblaj:

9. Li jam ne vivas. Li ne plu vivas.

Tamen, Zamenhof provis klarigi la diferencon, kiun li mem perceptis inter tiuj du formoj per la frazoj:

Mi jam ne vizitos lin (mi intencis tion fari sed ŝanĝis la intencon). Mi vin ne vizitos plu (mi antaŭe vizitis vin).

JAM NE, same kiel JAM, montras ŝanĝon de ago aŭ stato, sed NE PLU emfazas (ne)daŭron, (ne)ripeton.

Zamenhof plue konsilis uzi la formon ANKORAŬ NE anstataŭ la ebla formo NE JAM por eviti miskomprenon, kaj en la moderna literaturo oni ne plu trovas NE JAM.

(El Laŭ Okazaj Notoj, de A. Venture).

* * * * *

Jen, la frazo entenanta la 6 tempojn menciita dorsflanke: La buĉisto diris, ke li bedaŭras, sed estos necese, ke mi pagu kontante, kvankam estas pli oportun^e al mi pagi kredite.

* * * * *